

ISSN: 0827-3154

Revuo de Kanada Esperanto-Asocio

2006/1

printempo/somero

Mailed under Canada Post Publications Mail Sales Agreement No. 40046355 for the *Lumo*

LUMO



Climax, Saskatchewan

La hejmo de Chuch Carson, la plej granda mecenato de la Kanada Esperanto-Asocio

Lumon eldonas dufoje en jaro KEA, P.O.Box 2159, Sidney (BC) Kanado V8L 3S6 < www.esperanto.ca/kea/ >
Lumo ('light') is published twice yearly by the Canadian Esperanto Association
Lumo ('lumière') est la revue semestrielle de l'Association canadienne d'espéranto

ENHAVO DE LA NUMERO

Letero de Wally du Temple, Prezidanto de KEA -----	3
Nova hejmo por la Kanada Esperanto-Fondaĵo -----	4
Resumo en Esperanto de angla lingva publika anonco de La Viktoria Fondaĵo kun la angla originalo -----	4
Kiel Traduki "presser" kaj Du trafaj Diskoj el revuo 'La Sago' -----	5
Lernindaj vortoj por komencantoj -----	6
'Heralito, Spinozo kaj Sartre inspiru nin' de Fabricio Valle redaktoro de Brazila Esperantisto -----	7
Terglobaj Voĉoj de Steven Brewer el 'Esperanto USA' -----	8
Mesaĝo de estrarano Alan Simon -----	9
Mesaĝo de estrarano Aarono Chapman -----	9
Financa Raporto de la Libro-servo de KEA -----	10
Solidarigita Financa Raporto de KEA por 2005 -----	11
'El Verda vivo ĵurnalista' de Gerard Escuer el Kataluna Esperantisto	12

Eldonkvanto de ĉi-tiu numero : 200

Redaktis : Wally du Temple

Pri la enhavo de la artikoloj prespondekas la aŭtoroj. Manke de indiko pri aŭtoro, respondecas la redakcio. Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Ni invitas niajn legantojn sendi siajn tekstojn, opiniojn, kaj kritikojn, kio ebligas plibonigon de la revuo. Lumon senpage ricevas la membroj de Kanada Esperanto-Asocio, kiel ankaŭ asocioj kun kiuj KEA havas interkonsenton pri interŝanĝo de revuoj.

Letero al vi de Wally du Temple, Prezidanto de KEA

Karaj membroj de KEA:

Mi estas ĝoja informi vin ke la Kanada Esperanto-Asocio (KEA) nun gardas kaj kreskigas la Kanadan Esperanto-Fondaĵon (KEF) ene de granda, komunuma fondaĵo, tiel nomata 'The Victoria Foundation'. Vi legos pli pri tio je paĝo 3.

Je la kovrilpaĝo estas bildo de la dometo de Chuch Carson, kiu dum sia vivo donacis pli ol cent mil dolarojn al UEA kaj KEA. Li vivis sen luksaĵoj en Climax, Saskatchewan, vilaĝo de 206 personoj. Lia domo estis sen tapiŝo, kaj ofte la hejtigilo por varma akvo de funkciis. Mi tranoktis ĉe li por du noktoj sur divano. Estis dum tiu vizito ke Chuck Carson donis al mi la unuan grandan donacon por la Esperanto-movado. En tiu momento naskiĝis la Carson Fondaĵo (CF) kaj la Kanada Esperanto-Fondaĵo. La Carson Fondaĵo interalie subtenis edukajn projektojn en Afriko kaj Sud-Ameriko kies movadoj poste fortiĝis. La historio de la CF aperos en alia numero de LUMO.

Sube estas foto de Wally du Temple, Jean Smythe, Alan Simon kaj Anne Neave kiuj honoras la kontribuon de kara Chuck Carson ĉe lia tombo.



Chuch Carson, dotis la Kanadan Esperanto-Asociation per granda monsumo por la ekstarto de la KEF. Poste, multaj membroj donacis sumojn al ĝi.

Nun mi invitas vin ankaŭ donaci laŭ viaj ebloj al la KEF. Bonvole uzi la enfermitan koverton kaj donacilon.


Mi donacas al vi nome de KEA la artkarton, " La Lingvo de la Parolbastono ." Se vi donacos \$100.00 dolarojn aŭ pli vi ricevos aron de 12. La teksto de la salutkarton estas havebla france, angle aŭ esperante.

Ĉu vi estas preta akcepti la defion? Sendube, ĉu ne. Kaj vi povas esti kontenta ke via donaco kreskos eterne pere de la laboro de profesiaj financaj investistoj-konsultantoj kiuj nun laboras por KEA pro nia agado ene de la Victoria Foundation.

Elkore vin salutas, Wally du Temple

Sube estas artikolo pri la Fondaĵo de Viktorio kiu anoncas al la ĝenerala publiko pri nova 'gastigata fondaĵo' kies nomo estas "The Esperanto Global Auxiliary Language Fund". La artikolo skizas la historion kaj nuntempan financon staton de la 'Fondaĵo de Viktorio'.

La 'Fondaĵo de Viktorio' estas granda komunuma publika fondaĵo kiu subvencias diversajn edukajn, kulturajn kaj karitatajn asociojn. Ene de ĝi estas 'gastigataj fondaĵoj' fondaĵoj de karitataj asocioj kiuj deziras kreskigi siajn fondaĵojn ene de la 'Fondaĵo de Viktorio' sed samtempe gardi la elspezkontrolon de la gajnita profito. Granda avantaĝo por KEA estas ke la profesiaj investkonsultantoj de VF laboras nun por KEA ankaŭ.



Our History

see our 70th anniversary publication

The Victoria Foundation was established through an Act of the BC Legislature in 1936, making it the second oldest community foundation in Canada. By the end of 2005, it was among the ten largest of the more than 150 community foundations throughout the country.

Hosted Funds

The Victoria Foundation fulfills the crucial role of assisting charitable organizations to accumulate endowments that can then generate operating funds and provide a sense of continuance and security. Donors are assured that their gifts will be held in perpetuity, while the annual distributions provide on-going support to the charities. A total of 35 hosted funds provide perpetual support for the goals of registered charities. The capital of these funds is investment managed by the Victoria Foundation and professional investment consultants.

The most recent endowment was established by The Canadian Esperanto Association, a registered charity with revenue Canada #118977487RR0001 which contributed \$40,000.00 as the initial capital for

"THE ESPERANTO GLOBAL AUXILIARY LANGUAGE FUND.

This fund will support the work of the Canadian Esperanto Association, a national educational association of the speakers and supporters of Esperanto in Canada who have a common interest in the use and promotion of the international language as a solution to the world language problem.

Financial Highlights

for the year ending December 31, 2004

- Total assets increased \$10.2 million to \$38.9 million
 - > Market value of the Foundation's assets grew to \$41.1 million
 - > Investment returns averaged 11% for 2004
 - > \$9.9 million received in donations and bequests

Kiel traduki?

KIEL TRADUKI... «PRESSER»?

La plej oftaj tradukoj de la franclingva verbo **presser** estas **premi** kaj **urĝi**, sed ni studos ĉi sube diversajn signifojn de tiu verbo kaj kelkajn kunmetaĵojn.

En la unua grupo da esprimoj, **presser** signifas: *apliki forton sur objekton, malvastigante la spacon okupatan de ĝi, aŭ puŝante ĝin ĝis senmoviĝo*; tiam la traduko estas **premi**:
 Presser des oranges = **premi** orangojn.
 Presser une éponge = **premi** sponĝon.
 Presser quelqu'un dans ses bras = **premi** iun en siajn brakojn.
 Presser un bouton électrique = **premi** elektran butonon.
Presser povas signifi: *fari reliefan markon sur io, frapante per gravurita matrico*:
 Presser un disque = **stampi** diskon.

En figura senco, **presser** povas signifi: *firme postuli, ke iu faru ion, pli ĝenerale: esprimi ideon de insisto aŭ eĉ de turmento*:
 On me presse de conclure = **oni insiste** petas, **ke mi konkludu**.
 On le presse de questions = **oni insiste** pridemandas lin.
 La faim le presse = **la malsato turmentas** lin.

En alia grupo da esprimoj, **presser** esprimas ideon de *urĝeco*:
 Rien ne vous presse de partir = **nenio urĝas** vin foriri.
 Il faut presser les choses = **necesas rapidigi** la aferon.
 Le danger presse notre fuite = **la danĝero urĝas** nian forkuron.
 Presser le pas = **rapidigi** siajn paŝojn.
 Rien ne presse, on a tout le temps = **nenio urĝas**, ni havas la tutan tempon.
 Dépêchez-vous, le temps presse = **rapidu**, urĝas.
 Dépêchez vous, le train ne vous attendra pas = **urĝigu**, la trajno vin ne atentos.
 Aller au plus pressé = **unue zorgi** la plej urĝan.
 Se presser de faire quelque chose = **urĝe** fari ion.

La refleksiva formo se **presser** povas esprimi ideon de *kunpuŝiĝo*, tradukebla per diversaj verboj, depende de la kunteksto:
 L'enfant se pressait contre sa mère = **la infano alpremiĝis** al sia patrino.
 La foule se presse devant la porte = **la homoj amasiĝas** antaŭ la pordo.

najbaro ne ĝemas,
kiam boto nin premas z



Ni konsideru nun kelkajn kunmetaĵojn:
 Presse-citron = **citronpremiilo**.
 Presse-purée = **trapremilo**, aŭ pli precize: **pureilo**.
 Presse-papiers = **paperpremiilo**.
 En komputiko tiu vorto signifas memoron, en kiun oni provizore deponas kopion de teksto, por transloki ĝin; oni povas traduki ĝin per **kopiujo** aŭ per **kliptabulo**.
 Presse-raquette = **rakedpremiilo**.
 Une usine presse-boutons = **butonprema fabriko**. ★

Andreo Andriu

Muziko

DU TRAFAJ DISKOJ

Hotel Desperado.

Esperanto Desperado - Danio

Post la aventuroj kiuj sekvestris la materialon kaj registraĵojn de Esperanto-Desperado en studio de Christiania en Kopenhago, ni povas diri ke tiu nova albumo havis ĉiujn malfacilaĵojn!

Ĝia realigado plenumiĝis finfine sub la signo de transmigrado tra kvar malsamaj studioj, kaj inter ili la Studio de La Trappe/Vinilkosmo por unu el la titoloj kantita de JoMo, jam malnova komplico de tiuj «desperantoj» senantaŭjuĝaj kaj senlimaj.

Necesas aldoni ke krom JoMo kaj diversaj muzikistoj, kiel gasto en unu titolo kantas ankaŭ Martin Wiese de Persone...

Per sonoj pruntitaj el skao, regeo, ritmoj kaj melodioj el Balkanoj, Hispanio, Mezoriento, Afriko, ktp., jen vera «mondmuziko» produktita de tiu ĉi bando jam esence hibrida pro la originoj de ĝiaj membroj el Danio, Bosnio, kaj Pollando, landoj kie la malvarmo kaj la longaj noktoj egalas la varmon kaj la festecan temperamenton de ties artistoj!

Neniu dubo ke ĉi tiu nova KD preterpasos la jam faman sukceson de la antaŭa disko (BroKantaĵoj - vkkd34). Jen do disko kiun

vi ne rajtos malhavi, kaj se hazarde Esperanto-Desperado koncertos proksime, nepre ne maltrafu ilin!

La libreto de la KD estas tutkolora kaj ornamita per bonegaj fotoj de Joel Cleary, kiun ni gratulas pro lia trafa rigardo!

Civilizacio

Strika Tango - Argentino

Ekde la vigla interveno en 1999 de la kantisto de Strika Tango, Alejandro Cossavella, kun la tiuepokaj Porkoj (vkkd 23), oni povis pensi ke lia baza kaj vigla roko estas frukto de elekto, devige ne-inversigebla, por trakonduki la lingvon de Zamenhof trans la barilojn kaj blenditajn pordojn per klabofrapoj. Ĉu estis pro manko de kulturo aŭ muzika tekniko sufiĉe klera, aŭ simple pro manko de pacienco por agi pli diplomate? Do bone, estas domaĝe por la fanoj de tiu stilo same kiel por la alergijaj kritikantoj, Alejandro estas ĝisfunda artisto, plurfaceta kaj altgrade talenta kiu ne ĉesos surprizi nin! Tiu ĉi nova albumo estas verko profunde inda je esperanta interkultura inklinado, kaj



ĝia aŭtoro, kiu postulas kun insisto la utilon de projekto transe de la lingvaĵo, ne hezitis lasi registri la klavarojn, blovinstrumentojn, kaj kelkajn perkutilojn de muzikistoj el diversaj horizontoj je miloj da kilometroj de sia hejma cirklo. Estas en la Studio de la Trappe, en la ejoj mem de Vinilkosmo, ke tiu muziko, tamen forte inspirita de la latinamerika tradicio, trovis la tutan deziran plurecon de Ale, kaj eskapas samtempe la etiketojn kiuj tendencas limigi la radiadon de tiaj kreaĵoj. Ne malpli ol 13 muzikistoj el pluraj malsamaj landoj partoprenis la surbendigadon, kaj por fini, La Desertoj Dezertaj, neformala bando, travidebla kaj abstrakta, kiel Ale priskribas ĝin al ni humure, konkludas per 3 aldonaj titoloj la verkon kiu jam estas densa kaj ebriga.

Tiu ĉi albumo estas pompa, inspirita, saturita per la suno kiu vidis ĝin naskiĝi, kaj fariĝos tutcerte meĵloŝtona referenco. Kaj se vi ne certe bone komprenis kial... do, aĉetu ĝin, kaj jen ĉio! ★

El la TTT-ejo de Vinilkosmo.com

Lernindaj vortoj por komencantoj:

ŜLOSI

1. Fermi per seruro:

Mi ĉiam ŝlosas mian ĉambron. Mi forgesis preni la ŝlosilojn. La pordo estis nur fermita senŝlose. La ŝlosilujo estas sur la tablo. Malŝlosu la pordon!

2. Malhelpi ies eliron, ŝlosante pordon:

Iu ŝlosis min en ĉi tiu ĉambro. Ora ŝlosilo ĉiun pordon malfermas. Oni enŝlosis la principon per kvar seruroj.

MODESTA

1. Havanta malaltan opinion pri siaj meritoj, siaj scioj ktp.:

Ŝi estas modesta homo kaj pro tio ĉiuj ŝin ŝatas. Mia modesteco ofte malhelpas ekhavi novajn amikojn.

2. Ne tre alta, ne tre rimarkinda, ne tre valora:

Miaj elspezoj estis modestaj dum tiu vojaĝo. Rangeto rangon respektu, modestan lokon elektu. Via salajro estas malmodesta, pro tio vi povas aĉeti ĉion, kion vi volas.

TEGI

1. Kovri ĉiufanke per tuko speciale destinata kaj alĝustigita por tio:

Ni tegis malnovmodajn meblojn per modernaj kovriloj. Dum nia foresto mebloj estis kovritaj per kontraŭpolvaj tegoj. Kiam ni revenis ni maltegis la meblojn.

2. Daŭre kovri ion per io tiamaniere, ke la kovraĵo formas tuton kun la kovritaĵo kaj estas parto de ĝi:

Oni tegis la murojn de la hotelo interne per oro. Mia ĉambro plibeliĝis post la tegado de ĝiaj muroj per tapeto. Li deprenis la tegaĵon de la kablo.

KREVI

1. Subite rompiĝi pro interna tro granda premforto:

La balono krevis. De tro multa scio krevas la kranio. Maro ĉiujn riverojn ricevas kaj tamen ne krevas.

2. Fendiĝi pro malvarmo, sekeco ktp: La falinta taso krevis. Mi hazarde krevigis la vazon de mia patrino. Ekstere estis kreviga malvarmo, pro tio ĉiuj restis hejme. Miaj manoj doloras pro haŭtaj krev(aĵ)oj sur ili.



Fabricio Valle
Cefredaktoro

Heraklito, Spinozo kaj Sartre inspiru nin

La mondo ŝanĝiĝas. Cetere, la mondo ĉiam ŝanĝiĝadas, kaj tio ne estas novaĵo. Jam en la antikva Grekio, Heraklito, antaŭ-sokrata filozofo, asertis prave, ke neniam eblas eniri la saman riveron, ĉar ĝi konstante fluas kaj ĝi neniam estas la sama. Tio estas laŭ mi unu el la plej inspirigaj instruoj de la filozofio.

Tiel, la fluo de la rivero nomata Mondo ĉiam alportas al ni novajn aferojn, novajn pripensindaĵojn, novaj perspektivojn, novajn rimedojn, kiuj kvazaŭ fiŝoj defilas antaŭ niaj okuloj. Ĉu ni kapablos aŭ ne kapti ilin kaj kuiru ilin laŭ nia recepto, tio estas alia afero.

Nu, sur la kampo de filozofiaj aferoj enhaviĝas ĉies gustoj: estas idealistoj, realistoj, pragmatistoj, ekzistadistoj ktp. Ĉiu laŭ sia propra mondokoncepto intervenas en la mondumaj aferoj. Por multaj nenio novas sub la suno; por tiuj, tio, kio estas, fakte estas; tio kio ne estas, fakte ne estas. Por Sartre, Dio ne ekzistas kaj el tio oni devas ĉerpi ĉiujn eblajn konsekvencojn. Sartre ja estis praktika homo. Por Spinoza Dio ja ekzistas, kaj kiom interesa estas la laŭspinoza Dio!

Kaj la esperantistoj, ĉu ili adoptas bazan

filozofion pri sia agado? Ĉu nia afero povas fariĝi studobjekto de la filozofia elpensumado? Kiuj praktikaj konsekvencoj ni ĉerpu el nia filozofio de Esperanto?

Ĉu ni, kvazaŭ laŭ Sartre-sinteno, devas kredi, ke Esperanto estas la plej taŭga internacia lingvo, kaj elpluki ĉiujn eblajn konsekvencojn el tio? Ĉu ni devas konvinkiĝi ke la mondo ĉiam ŝanĝiĝadas, kaj ke ni devas esti atentaj al la fluo de la rivero, se ni volas kapti la novajn kaj bongustajn fiŝojn, kiujn alportas la nova mondo? Ĉu ni agu konservative, laŭ la principo, ke nenio novas sub la suno, do ankaŭ en la Esperanto tiel devas esti?

Ververe, ni estas antaŭ gravega defio, nome, adapti nin al moviĝegema mondo. Io nova ŝvebas en la aero, kaj ne estas nur plumoj de verdaj papagoj feriantaj en tropikaj paradizoj. Ni estu atentaj al la fluoj, kiel Heraklito, kaj radikalaj en la serĉado de konsekvencoj ekde nia konceptado pri la monda lingvujo. Farendajoj multas, nenio prokrastendas, jen proponata devizo por nia fiŝkaptado en la rivero de Heraklito, per la fiŝkaptado de Sartre, post meditado pri la Dio de Spinozo.

Kio estas la eĥo

„Paĉjo, ĉu vi povas priklarigi al mi, kio estas la eĥo?”

„La eĥo? Tio estas la sola estaĵo, kiu kuraĝas diri la lastan vorton, kiam parolas via patrino”.

Bone observita

„Via loĝejo, sinjoro Saulit, verŝajne estas tre malgranda kaj mallarĝa?”

„Tio estas la vero, sinjoro Egle. Sed kiel vi tion divenis?”

„Mi tion vidas laŭ la vosto de via hundo: ĝi la voston svingas ne de maldekstra al dekstra flanko, sed de supro al malsupro”.

En stranga mondo

„Hm! ĝuste ridinde: en la malhela nokto brilas tia malforta luno, sed la granda suno montriĝas nur en la tago, kiam jam sen ĝi estas hele”.

Ĉifoje li ne mensogis

„Ĉu tio estas vero, ke Liepa sidas en mal-liberejo?”

„Jes!”

„Kia mensogulo! Al mi li diris, ke li veturos por du monatoj al sia frato!”

„Vere. Li ne mensogis, ĉar ankaŭ lia frato sidas malantaŭ la kradoj”.

Amikoj de muziko

„Paĉjo, kiun komponiston vi pli multe ŝatas, Vagneron aŭ Mocarton?”

„Malfacile respondi, filo mia. Tamen al mi ŝajnas, ke Mocarto estas pli aminda”.

„Tiam estas bone, paĉjo, ĉar mi ĵus disrompis la buston de Vagnero”.

La ĉefa afero

„Ĉu vi edziniĝus je malŝparemulo?”

„Kiom li havas por malŝparemi?”

Terglobaj Voĉoj

Steven Brewer

Dum la printempo de 2005, mi trovis novan blogon* kies nomo estas "Global Voices" (GV): <http://www.globalvoicesonline.org/> Ĝi estis la kreaĵo de Ethan Zuckerman kaj Rebecca McKinnon ĉe la Centro Berkman por Leĝo kaj Socio ĉe Universitato Harvard. Ili okazigis konferencon en decembro 2004 por internaciaj blogistoj kaj ĵurnalistoj por diskuti la eblecon ke blogoj povas doni fenestron inter kulturoj. La blogo kiun ili starigis serĉis tion kion ili nomis "pontblogoj" kiuj diskutas lokajn aferojn (politikon, novaĵojn, ktp) en pli larĝa komunumo: ĝi klarigas aferojn kiuj por loka legantaro jam klaras. La blogo rapide fariĝis sufiĉe konata kaj legata trans la reto.

Ili ankaŭ starigis vikion por subteni sian laboron: http://www.globalvoicesonline.org/wiki/article/Main_Page. Ili dividis la mondon laŭ landoj – rezulte estas paĝo por ĉiu lando (bonvolu kompreni ke ili decidis tiel fari nur post longa diskuto pri la meritoj kaj problemoj de tiu [kaj iu alia] solvo kaj elektis tion sciante ke ĝi malplaĉos al multaj). Ĉiu landa paĝo havu ligojn al diversaj novaĵfontoj tra la mondo por ekkompreni tiun landon kaj, precipe, pontblogoj. Ankaŭ ĉe la vikio oni havis manifeston kiun oni tradukas en multajn lingvojn. Mia unua ago estis traduki la manifeston en Esperanton:

Ni kredas je libera parolo: protekti la rajton paroli — kaj la rajton aŭskulti. Ni kredas je universala aliro al la iloj de parolo.

Laŭ tiu celo, ni volas ebligi ke ĉiu kiu volas paroli ekhavu la kapablon paroli — kaj ke ĉiu kiu volas aŭskulti tiun parolon ekhavu la kapablon tion aŭdi.

Dank' al novaj iloj, parolo ne plu devas esti regata nur de tiuj kiuj kapablas eldoni kaj distribui. Nun, ĉiu povas utiligi la povon de la presilo. Ĉiu povas rakonti siajn rakontojn al la mondo.

Ni volas konstrui pontojn trans la kulturaj kaj lingvaj golfoj kiuj dividas la popolojn, por ke ni komprenu unu la alian pli bone. Ni volas kunlabori pli efike, kaj agi pli potence.

Ni kredas je la potenco de senpera komunikado. La ligoj inter individuoj de malsamaj mondoj estas personaj, politikaj, kaj potencaj. Ni kredas ke konversacioj trans limoj estas esencaj al estonteco libera, justa, prospera, kaj subtenebila — por ĉiuj civitanoj de tiu ĉi planedo.

Dum ni daŭre laboras kaj parolas kiel individuoj, ni ankaŭ volas identigi kaj promocii niajn komunajn interesojn kaj celojn. Ni promesas respekti, helpi, instrui, lerni de, kaj aŭskulti unu la alian.

Ni estas Terglobaj Voĉoj.

Laŭ mia scio, ili neniam estis priprensinta Esperanton kiel rimedon aŭ solvon en sia laboro.

Mi komencis aktivi iomete ĉe GV. Mi laboris pri la vikio, forpreninte spamaĵojn, ĝustigante paĝojn, ktp. Mi ankaŭ, en ties paĝo pri novaj ideoj, verkis mallongan eseon por sugesti ke ili konsideru Esperanton. Mi partoprenis la semajnajn diskutojn kiujn ili okazigis pere de reta babilo programo kaj, finfine, starigis paĝon kiu enhavas Esperant-lingvajn blogojn.

Terglobaj Voĉoj havas paĝon kiu listas paĝojn laŭ landoj. Pro tio ne estis loko por paĝo pri Esperanto. Mi tiel kreis paĝon por Esperantio kaj sub tiu paĝo indikis paĝon por Esperanto. Por konstrui la liston de blogoj, mi uzis la strukturon kiun Terglobaj Voĉoj uzas kaj komencis

<http://www.globalvoicesonline.org/>



per la listo de blogoj kiun kompilis Luis Guillermo Restrepo Rivas ĉe sia blogo Skribitaj Pensoj: <http://skribitaj-pensoj.blogspot.com/> Al tiu mi aldonis multajn blogojn kiujn mi trovis per multaj zorgaj esploroj pere de Google, Technorati, kaj aliaj serĉpaĝoj.

Mi ankaŭ interŝanĝis kelkajn retroŝtojn kun la fondintoj. Unu el ili, profesia ĵurnalista, mal multe interesiĝis pri Esperanto. Alia, teknikisto, pretas pripensi kiel Esperanto povas havi voĉon kaj partopreni. Je tiu momento, oni forviŝis la paĝon pri Esperantio. Mi lasis mesaĝon ke, ĝis oni decidis kian rolon Esperanto povas ludi, kie ĝi troviĝas inter la Terglobaj Voĉoj, mi ne plu partoprenos aŭ helpos subteni la paĝojn. Post ioma tempo, oni decidis ke la Esperanto-paĝo daŭre ekzistu, sed ke la indiko al la paĝo ekzistu je ĉiu landa paĝo por kiu troviĝas taŭga pontblogo en Esperanto.

En decembro, okazis monda konferenco por la projekto "Terglobaj Voĉoj" en Londono. Mi ne povis pagi la vojaĝkostojn al Londono, sed mi supozis ke samideano en Londono eble povus partopreni por reprezenti la esperantistojn. Mi kontaktis Edmund Grimley-Evans kiu proponis Tim Morley kiel la plej taŭgan homon por la celo. Ni parolis Skajpe** kaj interŝanĝis kelkajn retroŝtojn dum mi klarigis al li miajn

celojn je partopreno: Jen homoj kiuj havas la samajn celojn kiel esperantistoj kiuj neniam vere aŭdis pri Esperanto. Unu grava celo de la konferenco estis diskuti kiel trakti la lingvajn problemojn de la projekto. Oni registris kion diri s-ano Morley:

"Mi estas aktiva en la Esperanto-movado dum la pasintaj kvar jaroj. Kiam mi trovis Terglobajn Voĉojn kaj ties manifeston, ligojn, konversaciojn trans limoj, duono de mia menso pensis ke tion mi kutimas vidi, ĉiuj akordis, sed tiam mi rekonis, ho ne! Tio ne estas Esperanto-organizaĵo. Ĝi ŝajnas al mi kiel Esperanto-organizaĵo kiu ĝis nun ne malkovris Esperanton. Sed en la vikio, jen estas jam longa listo de blogoj kie homoj verkas Esperante. Mi ne estas unu el ili, sed mi legas kelkajn el ili. Se oni pensas pri la estonteco, se ni celas partoprenon de ordi-

Mesaĝo de estrarano Alan Simon

Mi salutas ĉiujn membrojn de KEA nome de la samideanoj en Alberto. La movado fartas relative bone en Calgary, dank' ĉefe al la senlaca laboro de David Yaki, kiu organizadas kursojn kaj kunvenojn en sia modesta, tamen tute taŭga, esperanto-centro.

Planu jam nun ĉeesti la grandan eventon de 2007: Inter la 20a kaj 26a de majo okazos TAKE-7, la sepa tutamerika kongreso de esperanto, en la universitato de Calgary. Multaj eminentaj el Usono kaj Sudameriko jam (pli-malpli) promesis partopreni. La retpaĝo www.take7.ca provizas pli da informoj, kaj la perreta aliĝo baldaŭ eblas.

Aliloke en Alberto loĝas pluraj unuopaj membroj. Mi bonvenigas iliajn mesaĝojn - ĉu letere, telefone aŭ rete. Fakte, se iu membro havas sugestojn, plendojn aŭ demandojn pri la laboro de KEA bonvolu ne heziti -- mi kaj la aliaj estraranoj estas je via servo.

Mesaĝo de estrarano Aarono Chapman

Saluton!

Jen estas mia salutteksto:

Korajn salutojn de printempe florbunta Vankuvero al ĉiuj KEA-anoj trans nia vasta lando!

Multaj el vi vojaĝemaj verduloj nun faras fruajn planojn por viaj someraj aventuroj en kiuj vi espereble spertos la belan kaj inspiran etoson de Esperantujo en plej diversaj situacioj. Mi deziras al vi bonan amuziĝon kaj lernadon en tio.

Tamen, de tempo al tempo, estas facile iom perdiĝi en la ĝuado de la riĉeco de niaj lingvo kaj komunumo sen multe pripensi kia estis la vivo antaŭ ol ni esperantistiĝis. Ne ĉiu el ni povas esti heroo varbisto, sed indas pripensi ĉu estas situacioj en via vivo per kiu vi povus oferti iom da enkonduka scio pri Esperanto kaj veki intereson pri ĝi. Estas multaj similideanoj kiuj jam pretas plivastigi siajn horizontojn. Nur kontraŭi mitojn kaj montri vian entuziasmon ofte sufiĉas por lasi fortikan ĝermon en tiuj kiuj komprenas la valoron de Esperanto.

Samtempe, se mi rajtas tiel aŭdaci, mi invitas vin postvarbe retiriĝi en nian komunumon per aŭskultado kaj partoprenado en la elsendoj de Radio Verda ĉe radioverda.com. Ĉi tiu kanada iniciato rapide disvastiĝanta estas internacia retradio kiu informos kaj distros vin per diversaj temoj kaj akceptas viajn kontribuojn. Speciale al tiuj kiuj ne facile povas vojaĝi al Esperantujo mi proponas aŭskultadon por sperti Esperanton kiel vivantan lingvon.

Dankon pro via subteno de KEA kaj bonŝancon kaj kuraĝon por viaj propraj entreprenoj.

* blogo: ne-PIVA vorto kun signifo simila al *retotaglibro*. Ĝi devenas de la samsignifa angla vorto *blog*, kiu estiĝis el mallongigo de la vorto *weblog*, t.e. "retprotokolo" (laŭ Vikipedio)
** Skajp (*Skype*): interreta telefono

LibroServo de Kanada Esperanto-Asocio - Financa raporto por la jaro 2005

Enspezoj :

1-Vendoj en 2005 : 2,624.62\$*
2-Repagitaj sendkostoj : 324.97\$*

Enspezoj entute : 2,949.59\$

Elspezoj :

1-Libro/varoj aĉetitaj : 1, 694.88\$*
2-Poŝtaj elspezoj : 541.22\$
3-Dogano : 00.00\$
4-Administrado : 323.48\$*
5-Bankaj kostoj : 6.50\$
6-Ministerio financa kebekia: 32\$*
7-Katalogo: 100\$
8-Paperaĵoj: 121.94\$*

Elspezoj entute: 2,820.02\$

Valoro de la inventario fine de 2004: 18,109.90\$

Valoro de la inventario fine de 2005 : 15, 998.79\$

Saldo en la banko 2005-01-01 : 4,715.15\$

Saldo en la banko 2005-12-31 : 3, 489.20\$

Saldo en la eta kaso 2004-01-01 : 29.87\$

Saldo en la eta kaso 2004-12-31 : 261.97\$

Saldo ĉe UEA-konto en Roterdamo 2004-12-04: 52.59 eŭroj

Saldo ĉe UEA-konto en Roterdamo 2005-11-30: 915.07 eŭroj

Klarigoj pri enspezoj : *1-La vendoj malprogresis je +- 1300\$ en 2005 kompare kun 2004. Estis 23 mendoj en 2003, 53 en 2004 kaj 65 en 2005 (BC 6, AL 4, ON 8, QC 30, NS 4, NB 1, USA 6, alie 6) Denove vendoj dum ARE estis altaj kaj sumis 650\$ Estis pli da internaciaj vendoj en 2005. *2-La klientoj repagas la sendkostojn kaj ni kalkulas tion aparte ĉar ne temas pri vendoj.

Klarigoj pri elspezoj : *1-Ni aĉetis ĉefe vortarojn, lernlibrojn kaj la libron Nanatasis.

*4-Pago al helpantoj por inventario, deĵorado, ktp. *6-Ni devas jare registri la LS.

*8-Diversaj aĉetoj, kovertoj, ktp.

Je unua vido la servo aspektas ne tre profita sed la celo estas oferti servon al la esperantistaro en Kanado.


Normand Fleury respondecis pri la mendoj/vendoj/administrado/inventario/librotenado.
Helpis : Zdravka Metz ordigado/inventario/sendado, Mira Metz-Fleury vendo dum ARE
kaj Martin Benoit katalogo reta/papera. 2006-02-19 FINO

Kanada Esperanto-Asocio
Solidarigita Financa Raporto Por La Jaro 2005

	2005	
Enspezoj:		
Vendoj	2,950	
Interezo	1,500	
Membropagoj	1,351	
Donacoj	1,240	
Diversaj	321	
	<hr/>	
	7,362	
Elspezoj:		
Acxetoj	2,977	
Oficejo	2,537	
Gazeto	1,035	
UEA	1,451	
Reklamado	510	
Transporto	504	
Telefono/fakso	463	
Bankaj elspezoj	42	
Edukado	900	
	<hr/>	
	10,419	
Kresko (malkresko)	(3,057)	
	<hr/>	
	2005	2004
Asocia Aktivo		
Mono	7,058	24,799
Investoj	38,000	24,205
Inventaro	19,299	18,410
	<hr/>	<hr/>
Saldo je la komenco de la jaro	67,414	64,834
Kresko (malkresko)	(3,057)	67,414
	<hr/>	<hr/>

El verda vivo ĵurnalista

Gerard Escuer



Eble tiu sinsekvo de okazintaĵoj donis al la aŭtoro ties skeptikan karakteron tiel utilan por ĵurnalisto aŭ por esperantisto, kiu neniam kabeos. Tamen, la kontrasto inter la partopreno en la esperanta-movado kaj la ĉiutaga vivo implicate iĝos evidenta. En la adolesko, la katolika seminario aperas kvazaŭ prizono rilate la liberalan etoson de la esperantaj kongresoj.

Konatiĝi kun Stefan Maul sendube ja estus interesa afero. Rigardante lian longan karier-tabelon iu ajn konkludos, ke li estas ne elĉerpebla fonto de travivaĵoj kaj sciigoj: ĵurnalisto, membro de Akademio de Esperanto kaj Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino, fondinto kaj longe la ĉefa motoro de la internacia magazino *Monato*, verkisto de eseoj, manlibroj, i.a. Tamen, same kiel ĉiu ajn esperantisto, malantaŭ tiu impona kolekto da honorajoj iam estis favoraj kondiĉoj, pro kiuj la verda afekcio ekjukis.

La verko de Stefan Maul, titolita "El verva vivo ĵurnalista", ebligas trairi lian vivon per rememoroj, okazintaĵoj kaj spertoj, de lia infanaĝo ĝis nun, kaj samtempe kompreni kial kaj kiel li esence iĝis esperantisto kaj ĵurnalisto. Ne strikte temas pri membiografio, ĉar laŭ lia modesta aserto, "tiom grava mi ne estas". Nur pri kolekto da faktoj verkitaĵoj preskaŭ kiel gazetara raporto ĵurnalista. Tiu stilo ne forkaptos la atenton de la legonto, kiu ja ekde la unuaj impresoj estos engaĝita pri la legado.

Tiasence, ege interese estas legi pri la longa marŝado, kiun lia tuta familio devis efektiviĝi, forlasinte la hejmon en Kroatio pro la dua mondmilito. La leganto baldaŭ komprenos, ke ne temas pri simpla anekdoto inda por rakontadi dum familiaj altabligoj. Ĝi estas vera turnopunkto al vico de misfortunoj kaj sinkado. Ekde la rekomenco en Bavario, la vivo ne estos la samo. Sekve de tia malfacila infanaĝo, la junan Stefan obsedos la deziro iĝi katolika pastro, sed tio montiĝos komplika celo, ĉar familia sekreto kaj akcidento kun esperantistino malebligis tiun revon.

Per la libro, la legonto ankaŭ sciigos pri katolikaj rondoj, ĵurnalismaj medioj, aspektoj de la esperanta movado, kaj pri la projektoj de Stefan Maul, interalie la naskiĝo de la gazeto *Monato*. Sed, kio plej gravas en la libro estas lia sinteno pri la esperantismo. Laŭ Maul, la ĉefa kaŭzo de tio, pro kio la internacia lingvo allogas novajn homojn malgraŭ ĝia eventuala fina malvenko estas la valoroj pri justeco ligitaj kun la movado. Tial, la esperantismo estis por la aŭtoro elirejo de la maljusta kaj netolerema socio. Sed memorigas, ke en la enkonduko, li mem elvokas sian sufiĉan "distanciĝemon" por ne laciĝi de la movado.

Bedaŭrinde tiaj demandoj pri la propra esperantisteco ne estas eksplicitaj dum la rakonto de lia vivo, kvankam lia ekzemplo starigas tiajn pripensojn. Rilate al tio, eble mankas pli rekta opinio, forĝita de la propraj spertoj, pri la evoluo de la movado ol simplaj impresoj pri aranĝoj, novaj interkonatiĝoj per esperanto aŭ kursoj prizorgitaj de la aŭtoro. Plej eble lia vidpunkto kiel ĵurnalisto ja estus interesa.

Ĉu tiel aŭ iel alie, lia laboro, jen kiel ĵurnalisto, jen kiel movadano, jen ambaŭ aferoj kune, rezultis fruktodona. Ekzemplo de tio estas la jena mencio pri la utilo de esperanto: "Dum miaj vojaĝoj [...] kiel ĵurnalisto, [...] [danke al la konfido de la vizititaj esperantistoj, mi] eksciis multe pli ol neesperantista germana ĵurnalisto". Do, ĉu nur pro la sperto de la aŭtoro, ĉu pro ties skeptika vidpunkto aŭ simple pro la atentokaptaj rakontoj, la legado de ĉi tiu libro ja estas konsilinda al tiu, aktivanta en la esperanta movado kaj al tiu, deziranta starigi novajn projektojn. □



Stefan Maul. *El verva vivo ĵurnalista*. FEL, Antverpeno, 2005. 269 paĝoj, 18 eŭroj